# Lukto kontraŭ la malfavora sorto

Fine de la lasta jarcento vivis en Parizo juna paro. La edzo estis laboratorio-helpanto ĉe Pasteur Instituto. Sed ĉar lia salajro ne estis tre alta ankaŭ la edzino laboris : ŝi estis mastrumistino. La 6-an de Aŭgusto 1897 naskiĝis Henri. Liaj gepatroj, ĉar laborante ili ne povis taŭge zorgi pri li, — eble ankaŭ ĉar ili preferis por li la kamparon —, decidis sendi la bebon al la edzinaj gepatroj vivantaj en urbeto en la departemento Sarthe, apud La Flèche. Tie vivis Henri ĝis sia tria jaro, dorlotata de siaj geavoj, konanta la vivon de la vilaĝaj geknaboj.

Kvar jarojn antaŭ lia naskiĝo la Parizanoj, kiuj ĉiam bezonis pli da akvo, decidis kapti la fontojn de la rivereto Avre, ĉe la limo inter la departementoj Eure kaj Eure-et-Loir. Per akvodukto 134 km longa, oni ĉiutage alfluigis al Parizo la puregan akvon de la fontoj. Sed estis necese ĉiutage kontroli la purecon de tiu akvo. Pro tio oni instalis en malnova muelejo laboratorion ĉe la vilaĝo Rueil apud la fontoj. Tien oni sendis la patron de Henri, kiu de tiu tempo povis vivi kun siaj gepatroj. Tie la knabo pasigis agrablegajn tagojn en tiu kamparo al kiu li enamiĝis por ĉiam. Li sekvis la patron al la laboratorio. Li trakuris kun li la kamparon por ĉasi. Li promenis kun li laŭlonge de la rivereto kaj iniciiĝis je fiŝkatado. Li naĝis, biciklis. Li vivis kun gepatroj nun iom pli riĉaj, la vivon de petolema, feliĉa solinfano, ĉar pli juna fratino mortis je sia dua jaro.



**Henri Micard kun siaj gepatroj**

Sed knabo, eĉ kiam li ŝatas la kamparon pli ol ĉion, devas viziti la lernejon. Tion li faris en la geknaba lernejeto de la vilaĝo. La instruiston, Sron Mouïard li multe ŝatis kaj eĉ multajn jarojn poste li parolis pri li kun granda emocio. Bona lernanto, li trapasis la ateston pri lernado en 1908 kaj la sekvan jaron preparis ekzamenon por ricevi stipendion. Li deziris fariĝi inĝeniero kaj tiucele devis viziti parizan lernejon. Bela estonteco sin malfermiĝis por la knabo.

En januaro 1909, kiel ofte okazis, Henri akompanis sian patron kaj kelkajn liajn amikojn por ĉasado. La knabo multe ŝatis tiun sporton kiu permesis al li trairi la kampojn kaj la arbarojn. Li estis preskaŭ 12 jara kaj ŝatis esti kun la plenkreskuloj kaj partopreni iliajn aktivaĵojn. Post longa, bona promenado eble laciga, ĉiuj ĝoje revenis hejmen al la vilaĝo. Antaŭ ol eniri la domon, pro prudenteco, unu el la ĉasantoj deziris malŝargi sian pafilon. Kio okazis ? Henri ricevis pafon en sian dekstran genuon, kiu estis frakasita. Oni transportis lin sur la liton. Dum kvin horoj oni atendis la kuraciston, kiu devis iri kvinkilometran neĝkovritan vojon per ĉevaltirata kabrioleto. Henri perdis multon el sia sango. La kuracisto faris sian eblon : purigado de la vundo, pansado. Li revenis ĉiutage sed la genuo infektiĝis kaj oni transportis la knabon al la hospitalo de Verneuil. Tie la kirurgo decidis fortranĉi la kruron, sed